

Numero 192
Februaro 2014

BULTENO

de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Aferoj de AAIE

Bonvolu remembiĝi por 2014

Se vi ankoraŭ ne remembiĝis por 2014, bonvolu fari tion baldaŭ por ke ni povos sendi la necesan informon al ILEI. (Membroj de AAIE estas aŭtomate membroj ankaŭ de ILEI.) Se vi pagas per ĉeko vi povas uzi la formularon sur la lasta paĝo de ĉi tiu *Bulteno*. Eblas ankaŭ rete remembiĝi ĉe <http://esperanto-usa.org/retbutiko>. (Elektu "AAIE/AATE Memberships" de la menu maldekstre.)

Se vi estas dumviva membro kiu ricevas la eldonaĵojn surpapere, ni petas, ke vi faru donacon al AAIE por helpi subvencii la koston per ĉeko pagenda al AAIE sendata al nia kasisto Chuck Mays ĉe 161 Dixie Trail, Raleigh NC 27607.

Please renew for 2014

If you haven't yet renewed your membership for 2014, please do so soon so we can send the required information to ILEI. (Members of AATE are automatically members of ILEI as well.) If paying by check you can use the form on the last page of this *Bulteno*. You can also renew on line at <http://esperanto-usa.org/retbutiko>. (Choose "AAIE/AATE Memberships" from the menu at left.)

If you're a life member who receives the publications on paper, we ask that you make a donation to help underwrite the cost by means of a check payable to AATE sent to our treasurer Chuck Mays at 161 Dixie Trail, Raleigh NC 27607.

Enhavo

Aferoj de AAIE

Bonvolu remembiĝi por 2014.....	1
Protoko de la 54-a Jarkunsido.....	1
Pardonpeto de la redaktoro.....	2
Jar-raportoj	
de la Prezidanto.....	3
de la Kasisto.....	3
de la Koresponda Sekretario.....	3
de la Redaktoro de la <i>Bulteno</i>	3

Aferoj de ILEI

Nova Redaktoro por <i>Juna Amiko</i>	4
--	---

Instruado

Nord-Amerika Somera Kursaro 2014.....	4
---------------------------------------	---

Artikolo

Time to Implement a Neglected Revolutionary Idea by Ronald J. Glossop.....	5
Kalendaro.....	9
Kino-Teatro-Festivalo kaj NOREK.....	10
En la Venonta Numero.....	10
Course Report Form.....	11
Membership Form.....	12

Protokolo de la 54-a Jarkunsido de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

ĉe Universitato William Peace en Raleigh, Nordakarolino, Usono

la 6-an de julio 2013 de 17h ĝis 17h50
(kadre de la landa kongreso de Esperanto-USA)

Ĉeestis 11 personoj: Jeremy ALDRICH, Neil BLONSTEIN, Mar CARDENAS, Ellen EDDY, Enrique ELLEMBERG, Ron GLOSSOP, D. Gary GRADY, Lusi HARMON, Maria MURPHY, Derek ROFF, kaj Sherry WELLS.

1. Prezidanto Ron GLOSSOP bonvenigis la grupon kaj prezentis la ĉeestantajn estrarojn: Jeremy ALDRICH kaj D. Gary GRADY. Gary ANDERSON, Chuck MAYS, kaj Doroteo HOLLAND ne ĉeestis.
2. La protokolo de la pasintjara kunsido en Dalaso, Teksaso estis unuanime aprobita.
3. Raportoj de la estraranoj estis aprobitaj:
 - a) Kasisto Chuck MAYS (perpapere): La saldo je la unua de majo 2013 estis \$3434.01.

Redaktoro: Gary Grady, 3119 Lassiter Street, Durham NC 27707-3888 USA <Gary@DGaryGrady.com>

Prezidanto: Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

Vic-Prezidanto: Jeremy Aldritch <gxeremio@gmail.com>

Eduka Sekretario: Gary Anderson <ganderson@SeattleAcademy.org>

Kasisto: Chuck Mays, 16 Dixie Trail, Raleigh NC 27607 USA <charles.o.may@gmail.com>

Koresponda Sekretario: Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA <dorothyh77@gmail.com>

- b) Prezidanto Ron GLOSSOP: Oni silentis dum momento pro la forpaso de kelkaj membroj ĉi-jare: Mary NAPOLITAN, Dori VALLON-WHEELER, kaj Gertrude NOVAK. Ni ricevis tri novajn memrojn ĉi-jare. Li dankis la estraranojn pro siaj laboroj kaj agnoskis la sukceson de NASK. Duncan CHARTERS kaj li iros al la ILEI-konferenco en Sieber ĉe Herzberg am Harz en Germanio ĉi-somere.
 - c) Korespanta Sekretario Doroteo HOLLAND (perpapere): Ŝi klarigis la proceson por ricevi membro-kotizojn.
 - d) Vic-Prezidanto Jeremy ALDRICH: Li diris ke estis facile re-aligigi membrojn ĉi-jare dank'al la ebleco pagi perrete je la Esperanto-USA retbutiko.
 - e) Redaktoro de la AAIE-Bulteno D. Gary GRADY: Li notis ke estis nur 2 numerojn de la Bulteno ĉi-jare sed verŝajne tio ŝanĝiĝos dum la venonta jaro. Se iu havas ion por aldoni al la AAIE retejo (<http://aaie.us>), kontaktu lin.
4. Raportoj pri la Usona Perkorrespondanta Kurso kaj Usona Ekzamana Servo de Doroteo HOLLAND (perpapere).
 5. Niaj tri reprezentantoj por la ILEI-Komitato estas Duncan CHARTERS, Ron GLOSSOP, kaj Lusi HARMON. Se oni havas peton por ILEI, sendu ĝin al Ron GLOSSOP.
 6. Ĝenerala diskuto:
 - a) GLOSSOP kaj GRADY priparolis la uzon de Google+ Hangouts kaj kiel instruilo kaj kiel maniero organizi aranĝojn.
 - b) ALDRICH demandis pri la rolo de AAIE en la nuntempa mondo kun lernu.net, edukado.net, ktp. kaj ĉu ni estu faka grupo por instruistoj de Esperanto aŭ faka grupo por esperantistaj instruistoj. Fakte, en nia statuto ni havas ambaŭ celojn.
 - c) BLONSTEIN demandis pri la ebleco kunlabori kun lernu.net por informi lokajn grupojn pri novaj lernantoj en iliaj lokoj.
 - d) ELLEMBERG parolis pri la sukceso de lia retpaĝaro allogi homojn, kaj la malfacileco instigi ilin daŭrgii en lernado. <http://esperantofre.com/faktoj/>
 7. Fermo de la 54-a AAIE-jarkunsido.

— Respekte submetita de Ĝeremio ALDRICH
portempa protokolisto

Pardonpeto de la redaktoro

Mi sincere pardonpetas pri la neapero de la *Bulteno* dum tiom da monatoj.

Dum multe de 2013, aparte dum la dua duono, mi suferis problemojn rilate dormadon pro kiuj lasis min dormema kaj sen energio fojfoje dum tutaj tagoj. Mi vizitis teamon de kuracistoj ĉe la hospitalo Duke kiu taksis mian malsanon iom mistera sed ne tute nekonata. Dum jaroj mi havas fortan dormapneon—t.e., mi emas ĉesi spiri preskaŭ ĉiun minuton dum mi dormas, tre ofta fonto de miaj simptomoj. Sed mi jam uzas maŝinon, kiu blovas aeron en mian nazon dum la noko (aparato DPAP—Daŭra Pozitiva Aervoja Premo) kiu evidente tre sukcesas en la kuraco de mia dormapneo. Do devas esti alia kaŭzo, sed neniuj scias, kio ĝi estas.

Malgraŭ tio, mi lastatempe sentas multe pli bone, kaj havas pli da energio, so mi esperas—kaj strebas—tuj rekomenci la regularan aperritmon de la *Bulteno*.

Jar-raportoj

Raporto de la Prezidanto

Unue mi volas danki al Ĝeremio ALDRICH, nia AAIE-Vicprezidanto, pro liaj bonaj laboroj instigi homojn realiĝi kaj/aŭ aliĝi al AAIE ĉi-jaron. Por la jaro 2013 AAIE nun havas 45 membrojn.

Dum la pasinta jaro ni havis 46 membrojn. Bedaŭrinde ni perdis kelkajn membrojn. En la AAIE-BULTENO de Novembro 2012 vi povis legi la nekrologiojn por du el ili, Mary NAPOLITAN de St. Clair Shores, Miĉigano kaj Dori VALLON-WHEELER de Burlingame, Kalifornio. Forpasis ankaŭ Gertrude NOVAK de Ĉikago, Ilinojso.

Nun ni ĝoje volas bonvenigi tri novajn membrojn, Annette GREENLAND de Vilonia, Arkansaso, Dale MILNE de Greeley, Kolorado, kaj John DALE el Milwaukie, Oregono. La limdato por membreco dum 2013 oficiale preterpasis, sed ni tamen eble povus trovi manieron aligi aliajn homojn.

Due mi volas danki la aliaj AAIE-estraranoj. Chuck MAYS, nia AAIE-Kasisto, ne nur sukcese pagis ĉiujn niajn fakturojn inkluzive la mono kiun AAIE ŝuldas al ILEI sed ankaŭ povis kunlabori kun Vilĉjo HARRIS por starigi novan manieron membriĝi al AAIE per kreditkarto tra la retbutikon de Esperanto-USA ĉe <www.esperanto-usa.org/retbutiko>. Li ankaŭ kolektis informon por pruvi ke AAIE devus altigi la koston por membreco kaj peti specialan financon helpon de dumvivaj membroj. Doroteo Holland, nia AAIE-Koresponda Sekretario, ne nur registris la protokolon por la 53-a jarkunsido en Dalaso sed ankaŭ ricevis kaj transsendis al la Kasisto multajn membrecojn. Ŝi ankaŭ post multaj jaroj ankoraŭ prizorgas nian Ekzamenan Servon kaj Perkorespondan Esperanto-Kursaron. Gary Grady tre bone redaktas nian AAIE-BULTENO-n kaj per ĝi provizas al niaj membroj multan gravan informon.

Trie mi volas danki al AAIE-membroj kaj aliaj Usonanoj kiuj bone laboris kaj laboras por Esperanto. Ellen EDDY, Chuck MAYS, Hoss FIROOZANIA, kaj Derek ROFF (kaj ne-membro Lee Miller) organizas kaj publikigas informon pri la NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO (NASK) kiu ĵus okazis dum la nuna somero [26-a de Junio ĝis la 5-a de Julio] ĉe Raleigh, Nord-Karolino tuj antaŭ ĉi tiu landa kongreso]. Joe Blum, antaŭa membro, kreis instruilon por Esperanto kiu nun estas havebla en la PDF-formato ĉe la retejo <http://www.aaie.us/wordpress/?page_id=278>.

La 54-a AAIE-jarkunsido nun okazas kadre de la kongreso de Esperanto-USA je dimanĉo, la sepa de Julio, je la dua horo ptm ĉe Raleigh, Nord-Karolino. Ĉar ni dum la pasinta jaro elektis niajn estraranojn por tri-jara deĵoro, ni ĉi-jaron havos pli da tempo por diskuti aliajn aferojn. Ekzistas multaj gravaj demandoj. Kian strategion oni devus uzi por povi instrui Esperanton en lernejoj kaj ankaŭ en aliaj lokoj? Ĉu prezentaĵoj ĉe konferencoj de instruistoj de fremdaj lingvoj estas utilaj? Se jes, ĉu AAIE devus provizi monon por subteni tiajn klopodojn? Kiel oni povus allogi lernantojn? Ĉu AAIE devus havi kunvenojn per Google? Ĉu estas ideoj pri kiel plibonigi la organizon AAIE?

Post malpli ol unu semajno okazos la 46-a ILEI-konferenco en Siber ĉe Herzberg am Harz, Germanio. Pasintan

jaron ĉe la 45-a ILEI-konferenco en Kunming, Ĉinio, nia AAIE-komitatano Vilĉjo HARRIS iĝis la ILEI-Estrarano pri Financoj (tio estas, Kasisto). Tial li ne plu rajtas servi kiel komitatano por AAIE. En oktobro la AAIE-estraro elektis membron Duncan CHARTERS esti nia tria komitatano al ILEI. La aliaj du AAIE-komitatanoj por ILEI estas Ron GLOSSOP kaj Lusi HARMON. Duncan kaj Ron partoprenos la 2013 ILEI-konferencon, kaj Ron estos la oficiala anstataŭanto por Lusi.

Mi dankas al vi pro via partoprenado en nia nuna 54-a AAIE-kunsido.

— Ronald GLOSSOP, Prezidanto, Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE)

Raporto de la Kasisto

Saldoj fine de pasintaj financaj jaroj

SALDO je 12-31-2009 \$ 3880.07
 SALDO je 12-31-2010 \$ 3359.62
 SALDO je 12-31-2011 \$ 2780.94
 SALDO je 05-01-2012 \$ 2572.96
 SALDO je 05-01-2013 \$ 3434.01

Enspezoj kaj elpezoj de la 1-a de majo 2012 ĝis la 1-a de majo 2013

Komenca saldo		\$ 2572.96
Enspezoj		
Kotizoj por 2013	\$ 722.00	
Donacoj	\$ 930.00	
Sumo		\$ 1652.00
Elspezoj		
ILEI-kotizoj	\$ 790.95	
Bulteno	\$ 0.00	
Edukado	\$ 0.00	
Sumo		\$ 790.05
Fina saldo		\$ 3434.01

Dankon al ĉiuj, kiuj donacis dum la jaro.

— Chuck Mays, Kasisto de AAIE

Raporto de la Koresponda Sekretario

Kiel Koresponda Sekretario de AAIE, mi ricevas de AAIE-membroj kotiz-ĉekojn, kiujn mi tuj plu-sendas al nia kasisto Charles Mays, post kiam mi skribas la informojn sur la karto de tiu membro. Kiam membro pagas sian kotizon per kredit-karto ĉe Esperanto-USA, mi ricevas de Vilĉjo Harris la detalojn, kiujn mi simile registras. En ambaŭ situacioj, mi tuj sendas dankon al la sendinto.

— Doroteo Holland, Koresponda Sekretario de AAIE

Raporto de la Redaktoro de la Bulteno

Mi bedaŭras raporti, ke mi sukcesis eldoni nur du numerojn de nia *Bulteno* inter la lastjara kaj la ĉi-jara

aferkunsidoj. Je pli feliĉa flanko, mi strebas laŭgrade iom plibonigi la aspekton de la *Bulteno* kaj de la retejo.

Mi esperas ke la *Bulteno* aperos pli ofte en la venontaj monatoj. Parenteze, mi daŭre miras, ke Doroteo sukcesis aperigi la *Bultenon* (kies enhavon ŝi verkis preskaŭ sole) tiom

regule dum ŝi estis la redaktoro kaj samtempe traktis multajn aliaj aferojn, inklusive la ekzamenservon, la perpoŝta kurso, ktp.

— *D Gary Grady, Redaktoro de la Bulteno de AAIE*

ILEI

Nova Redaktoro por *Juna Amiko*

Juna Amiko, la revuo de ILEI por junaj lernantoj, havas novan redaktiston Stano Marček el Slovakio kaj iras per nova elano al bonkvalita kaj enhavoriĉa eldonado. Stano Marček eldonis kaj eldonas diversajn revuojn kaj verkis sukcesan lernolibron; do li kutimas plenumi tian taskon, kiel eldonadon de revuo por lernantoj. En 2014 aperos 4 numeroj. *Juna Amiko* disponas je granda skipo de kunlaborantoj, entute 12 personoj, kelkaj el ili havas regulan rubrikon, aliaj sendas paĝon laŭ emo. La antaŭa redaktoro Stefan MacGill plu kunlaboros ene de la skipo. Stano Marček ne nur laboras per plej modernaj kaj profesiaj teknikoj, sed esploras pri kontaktoj kun retaj lernopaĝaroj. Plie prezentiĝas eblo havi retajn ekzercojn lige kun la enhavo de la revuo.

La prezo de la abono por unu jaro: Al A-landoj : 16 Euro. Al B-landoj : 11 Euro (rabato ekde mendo de 3 ekzempleroj).

La abonopago iru al: UEA per konto de Juna Amiko : juna-l. La adreso por aboni la revuon: Sébastien Cyprich, Pollando, sebacy@jabster.pl. [NdlR: Eblas aboni ankaŭ pere de la retbutiko de Esperanto-USA kontraŭ US\$20.87.]

La adreso de la redaktoro : redaktoro@gmail.com
Abonu! Donacu abonon! Lernu amuze per *Juna Amiko*!
Konigu la revuon en via loka klubo, landa asocio, ILEI sekcio!

Kontribuu per amuzaj rakontoj, enigmoj, ludoj, kantoj!

— *Anonco de ILEI je la 21-a de Novembro 2013*
iomete mallongigita

Instruado

Nord-Amerika Somera Kursaro 2014

(Sekvas teksto de la retejo <http://nask.esperantio.org/venonta>.)

Ĉi-jare NASK vojaĝas al la marborda Universitato de Viktorio, sur la kanada insulo Vankuvero en Brita Kolumbio. La kulture riĉa Viktorio estas konata kiel verda “ĝardenurbo” kun plaĉe mildaj someroj kaj pluraj vidindaĵoj por turistoj.

Datoj: 29 Junio – 8 Julio

NASK finiĝos ĵus antaŭ komenciĝo de la Landaj Kongresoj de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto Asocio. Ambaŭ eventoj okazos kune en apuda Sidneo, facile atingebla per buso. Do, se vi aliĝos al la LK-oj, vi povos partopreni ilin tiuj post NASK.

[*Noto de la redaktoro*: Efektive NASK finiĝos mardon la 8-an de julio kaj la Landa Kongreso komenciĝos vendredon la 11-an, do ne *tuj* post NASK, sed okazos aliaj aranĝoj dum la paŭzo por tiuj, kiuj partoprenos ambaŭ.]

Kotizoj

La kosto por NASK 2014 (kursoj, loĝado, matenmanĝoj) estas USD \$475 se oni kotizas ĝis la 1-a de Aprilo, kaj USD \$525 poste.

Lokanoj kiuj ne bezonas loĝejon rajtas pagi nur USD \$250 por partopreni en ĉiuj eventoj. Ni rekomendas ke oni planu elspezi proks. USD \$200 por tag- kaj vesper-manĝoj. Tiujn oni povas aĉeti en la ĉefa universitata manĝejo aŭ ĉe kelkaj malgrandaj manĝejoj en kaj apud la kampuso.

Stipendioj

Stipendia helpo haveblas por plentempaj lernantoj, instruistoj, kaj ankaŭ loĝantoj en Latinameriko. Sendu demandojn al la NASK-administranto.

Cetere, ĉi-jare haveblas stipendioj por kanadanoj, danke al

la Kanada Esperanto-Asocio. Petu informon de Geoffrey Greatrex, greatrex@uottawa.ca.

Instruistoj

Ĉiun jaron ni petas al famaj instruistoj kaj movadanoj el Esperantujo instrui ĉe NASK, kaj plaĉas al ni havi elstaran teamon denove en 2014:

István Ertl

Instruisto, supera kurso

István diplomiĝis pri la lingvoj Esperanto, franca kaj latina ĉe Universitato ELTE, Budapeŝto. Instruis tiujn lingvojn kaj la anglan mezlerneje; Esperanto-literaturon ĉe ELTE (1990-91) kaj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando (1999-nun). Laboris eldoneje, radie, ĉe Eŭropa Reto kontraŭ Rasismo en Bruselo, kaj de 2003 kiel tradukisto por la Eŭropa Revizora Kortumo en Luksemburgio. Redaktis la revuojn *Opus Nigrum*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Kontakto*, *Esperanto* (1992-2001); kunfondis la retan *Libera Folio*. Verkis beletrajn, i.a. la poemaron *Provizore* kaj la satiron *La Postdomo*, kaj tradukis el Borges, Conan Doyle, Kertész, Queneau, Seneko, Venclova, Verne ktp. Estis komitatano de UEA, membro de ties Elekta Komisiono, kaj nun membro de ties Konsilio.

Usui Hiroyuki

Instruisto, progresanta kurso

Esperantisto de 1981, Hiroyuki nun estas redaktoro de la Esperanto-sekcio de El Popola Ĉinio en Pekino. Pli frue, dum 21 jaroj li laboris kiel oficisto de la urba registaro de Suginami, Tokio.

Japanlingve li kunkompilis aŭ -aŭtoris plurajn librojn, pri lingvo-sociologiaj temoj inkluzive de Esperanto, kaj

kompiltradukis poemkolekton de William Auld. En 2007 li funkciis kiel kunorganizanto de la 5-a Nitobe-simpozio en Tokio, reĝisoro de la kongresa temo de la 92-a UK en Jokohamo, kaj prizorganto de la poezia vespero dum la sama kongreso, en kiu podianis i.a. István Ertl kaj Tanikawa Syuntaro, unu el la plej famaj poetoj de moderna Japanujo.

En 2010 li ricevis premion de la japana gazeto Chûgainippô pro japanlingva eseo, kiu pritraktis “sennaciisman” proponon de Kita Ikki, fama japana “ultranaciisto”. Translokiĝinte al Pekino en 2012, en la sekvanta jaro li elektiĝis al la Akademio de Esperanto, kaj komencis instrui Esperanton en Pekino al ĉ. dudeko da personoj de diversaj aĝoj.

Ĵenja Bondelid

Instruisto, komencinta kurso

Ĵenja diplomiĝis pri la instruado de Esperanto ĉe la altlernejo Principia College (BA, 1999) kiel studento de Duncan Charters. Sekvante lian bonan konsilon, ŝi studis ĉe la somera kursaro en Sanfrancisko inter la jaroj 1995 kaj 1998, kie ŝi lernis de Spomenka Ŝtimec, Katalin Kováts, Derek Roff, kaj David Jordan. En 2013 ŝi partoprenis en NASK denove, kiel studentinstruisto sub la gvidado de Lee Miller, kaj post tio instruis loka kaj starigis novan E-klubon ĉe la insulo Vidbeo, en Vaŝingtonio.

Ĵenja aktorin en la videokurso Pasporto al la Tuta Mondo (kiel “Helena”) kaj voĉaktoris Esperante en pluraj filmoj de Christopher Mihm. Ŝi rolas angle kaj Esperante sur loka scenejo, plej laste kiel germana Esperanto-instruisto en The Language Archive.

Ŝia plej lastatempa projekto estas organizado de Kino-Teatro-Festivalo, Esperanta scenarta festivalo kiu okazos en Aprilo, 2014. Profesie, ŝi laboras kiel danckomponisto kaj

baletininstruistino. Libertempe, ŝi aparte ĝuas malnovstilan kuiradon el loka haveblaj farmproduktoj.

Hoss Firooznia **Helpinstruisto**

Hoss diplomiĝis de la Universitato de Roĉestro en la fako de Kogna Scienco, kaj nun laboras tie plentempe kiel komputilisto, ankaŭ studante en la magistriĝa programo de Belarta Tradukado. Kiel studento, hazarda ekscio pri Esperanto inspiris en li deziron studi la lingvon serioze – unue ĉe la Universitato de Hartford, kaj poste ĉe NASK en San Diego. En 2011 li ricevis KER-diplomon je la plej alta nivelo (C1).

Li instruas Esperanton ĉe sia universitato ekde 2006, kaj ekde 2008 li redaktas la gazeton de Esperanto-USA, Usona Esperantisto. En 2013 lia tradukaĵo de La makulita bendo estis eldonita en novelaro de Arthur Conan Doyle. Ĉe NASK li redaktas la ĵurnalon La NASKa Fasko, diversmaniere helpas la instruistojn, kaj gvidas eksterkursajn programojn.

Loĝejo kaj manĝoj

Lernantoj estos en loĝejo kun unu- kaj du-litajn ĉambrojn, kun komunaj banejoj kaj necesejoj por ĉiu sekso en ĉiu etaĝo. Ĉiu ĉambro havas aliron al Interreto. En la kelo troviĝas lavmaŝinoj kaj sekigiloj por vestaĵoj, kaj ĉiu etaĝo havas komfortan salonon. La universitata manĝejo kaj klasĉambroj estas facile atingeblaj per mallonga promeno.

Ni provizos al vi litotukojn kaj bantukojn, sed ni rekomendas ke vi kunportu etan lampon por legi, vekhorloĝon, kaj vestarkojn.

Matenmanĝoj en la universitata manĝejo estas inkluzivitaj en la NASK-kotizo. Tag- kaj vesper-manĝojn oni povas aĉeti en la ĉefa universitata manĝejo aŭ ĉe kelkaj malgrandaj manĝejoj en kaj apud la kampuso.

Artikolo

Time to Implement a Neglected Revolutionary Idea

Ronald J. Glossop

Southern Illinois University-Edwardsville (SIUE)
Edwardsville, Illinois 62025, United States of America
rglossop@mindspring.com

(This article is in English because the June 2013 conference on the FUTURE OF EDUCATION in Florence, Italy where it was presented was entirely in English.)

One of the first measures to be introduced into the Assembly of the League of Nations in December 1920 was the proposal of Lord Robert Cecil, delegate of South Africa, that in order to deal with “the language difficulties which prevent direct relations between the peoples” it is to be hoped that “the instruction of the international language Esperanto” “will become general in the whole world, in order that children of all nations from now on would know at least two languages, their mother tongue and an easy means of international communication.” [Peter G. Forster, The Esperanto Movement, The Hague: Mouton, 1982, page 172]

The world now is greatly different from what it was in 1920. One of the major changes has been from an internationalism whose image of the world was a globe with many nations of different colors to a globalism inspired by photos of Earth from space as well as faster means of transportation and communication. We humans have transitioned from an inter-national world to a planetary community.

An important and too much neglected issue is what we should do in the way of language education for our children. Should each of them learn not only two languages but many languages? Should there be a plan for all of them to learn at least one common language; and if so, which language should it be? Should it be some national language such as English, or should it be a nationality-neutral, designed, easier-to-learn language such as Esperanto?

I maintain that it is desirable for our children to learn several languages but that nevertheless there should be a plan for all of them to learn one common language so that every Earthling would be able to communicate directly with every other Earthling. As a native speaker of English, I believe that English is not a good choice for the common language of planet Earth. To adopt any national language is unfair to all those children who have a different native language, and in the case of English that is 95% of them.

Despite my own wonderful experiences as an Esperantist, I am conscious that Esperanto is basically a European language and thus may need some minor modifications to better serve as the common world language. Esperanto has many features worth preserving, however, such as being completely phonetic and totally rule-guided with an ingenious system of affixes which greatly facilitates the quick acquisition of a large vocabulary. It has also been inspired by the ideal of the single human family.

I propose that the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization (UNESCO) appoint a commission to develop a nationality-neutral, easily learnable common world language so that we can begin to implement the wonderful ideal considered by the League of Nations almost a hundred years ago. Can anything be more important for the future of education?

1. The missed opportunity

One of the first measures introduced into the Assembly of the League of Nations in December 1920 was the proposal of Lord Robert Cecil that in order to deal with “the language difficulties which prevent direct relations between the peoples” it is to be hoped that “the instruction of the international language Esperanto” “will become general in the whole world, in order that children of all nations from now on would know at least two languages, their mother tongue and an easy means of international communication.” [1]

Unfortunately that revolutionary idea wasn't implemented. In the Assembly of the League of Nations any proposal could be adopted only if every member nation approved of it. One country opposed Lord Cecil's proposal. Which country? France. Why? Because the proposal indicated that Esperanto would be the world language to be taught, and the French claimed that French already was the world language. [2]

2. Beyond inter-nationalism to globalism

The French argued that Esperanto lacked a national culture. That argument, however, assumes the inter-nationalist outlook of the 20th century instead of 21st century globalism. Inter-nationalism views the world as a collection of nation-states whose members are basically confined to their own countries and who interact with each other through international organizations. The image for inter-nationalism is a world map with the various nation-states displayed in various colors. The global community of the 21st century is different. Its image is based on photos of Earth from space. All humans are members of one planetary community. Thus we should be able to communicate directly with each other.

When dealing with education, we must consider the world of the future. An important issue is what we should do with regard to language education for children. We need a plan for all of them to learn at least one common language so that all of them in this planetary community can communicate with all the others, not just those who happen to live in certain countries.

3. The language education issue before us

What should we be doing in the way of language education for our children? Should each of them learn not only two languages but many languages? Should they learn at least one common language? If so, which language should it be? Should we try to use as the global language some national language such as English or Chinese? Or should we select as the global language which all children would learn a nationality-neutral, designed, easier-to-learn language such as Esperanto?

Even though English is my native language, I want to argue against the view that English should be the common world language to be taught to children. I believe that the rational and morally correct choice for a first foreign language for all children is Esperanto.

I am not maintaining that our goal should be that children should learn only two languages, their first language and the common world language. The aim should be that people learn many languages, but all children should learn at least the common world language so that they can communicate directly with all other Earthlings.

4. The moral dimension of the world language issue

I urge everyone to take seriously the moral dimension of this issue of which first foreign language should be taught to all children. I believe it is fundamentally immoral to choose any existing national language to function as the world language.

If any existing national language becomes the common world language, nations which use that language acquire a status above others. This struggle for top status is the kind of competition that resulted in two world wars and the Cold War. Such competitive inter-nationalism is something we need to end.

To use any national language as the common global language is also unfair to all those children whose first language is another language. As a native speaker of English, I am constantly reminded of the unfairness of the existing situation. Others must learn a new language, but I can use my native language. How unfair! Furthermore, I am among the less than 5 percent of the world's people who use English as their first language.[3] Thus more than 95% of all people must learn a second language to be able to participate in international English-only conferences such as this one. Even if the world language were Mandarin Chinese, 88 percent of the world's people would have to learn it as a second language.[4]

If any national language is used as the common global language, countries which use that language will have an unjust economic advantage over others. Besides having the advantage of not needing to teach a second language to their children, they gain the economic advantage of having others come to their countries to learn their language. They also gain the economic advantage of not needing to use a second language on products which they sell.

5. The case against using English as the global language

Since all of the children of the world would need to learn the global language, this language should be relatively easy to learn. Since our aim is for children to learn many languages, they need to have a good first experience that will encourage them to want to study other languages. The best possibility would be a phonetic language in which the written language and spoken language can be learned together.

English is not such a language. Written English and spoken English are so different that they must be learned separately. It is not logical that the words "so" (S-O) and "do" (D-O) which look so much alike should be pronounced differently. It isn't logical that the words spelled S-E-W and S-O-W should be pronounced the same as S-O. In English words spelled similarly are pronounced differently such as the words spelled T-H-O-U-G-H and T-H-O-U-G-H-T and T-H-R-O-U-G-H. English contains many oddities such as the addition of the letter S to verbs in the third person singular. Irregularities exist with regard to different tenses of the same verb, such as "go," "went," and "have gone." Note the irregular conjugation of the verb "to be." "I am," "you are," "he is" and then in the past tense "I was," "you were," and "he was," not to mention the fact that in these words the letter S is pronounced like Z. These illogical aspects of English may cause many children to just give up on trying to learn any foreign language.

6. The case for using Esperanto or a version of it as the global language

Instead we should use Esperanto. Those who have not learned Esperanto don't appreciate how ingenious it is and how easy to learn. Those who have not taught Esperanto do not realize how quickly children can learn it.[5] Esperanto has 28 letters. Each has one and only one sound. Each of five vowels always indicates a separate syllable, and in each multiple-syllable word the stress is always on the next-to-last syllable. One can easily determine how a word is pronounced and how it is spelled.

If children of the world learned a designed language like Esperanto, other advantages would follow. One is the preservation of minority languages which now perish when confronting languages supported by powerful national governments. If Esperanto were used, members of those communities could continue to use their languages within their own communities and Esperanto for global communication.

A second advantage of having children learn Esperanto as their first foreign language is that they would develop a positive attitude toward learning new languages. Experiments have shown that students who have learned Esperanto more quickly learn other European languages.[6]

A third advantage of having children learn Esperanto is that they would develop an identity as a member of the world community just as learning a national language leads them to develop an identity with that national community.[7] If all the children of the world learned the same global language, they would think of themselves as members of the global community and would be less inclined to fight in wars against other members of that community.

A fourth advantage of having children learn Esperanto is that they would be able to use modern technology to communicate directly with other children everywhere.[8] Personal friendships could be developed without being hindered by national borders and different national languages.

Esperanto was designed to serve as the rapidly learnable language for international communication in the internationalistic 20th century. We should now make use of it as the global language in the 21st century.

7. Possible modifications to make Esperanto more culturally neutral

Esperanto may be considered a European language, and thus one could argue that it needs some modifications in order to serve as a culturally neutral global language. Might Esperanto be made more culturally neutral by incorporating terms from Asian and African languages? Nevertheless Esperanto in its present form has been enthusiastically supported by people throughout the world. The government of China has done as much as any national government to support the use of Esperanto.[9]

To deal with this issue, I propose that the United Nations Educational Scientific and Cultural Organization (UNESCO), which adopted resolutions expressing support for Esperanto in 1954 and 1985, appoint a commission to develop a slightly modified, more culturally neutral version of Esperanto. This commission should be given a deadline of five years. Several experienced Esperantists should be on this commission including some from Asia and Africa. This commission should also have members who are familiar with Hanyu pinyin and Swahili and Bahasa Indonesian. If the commission failed to produce the desired modified culture-neutral version of Esperanto by the five-year deadline, the existing version of Esperanto would be officially recommended by UNESCO as the common global language to be taught to all children everywhere.

8. Concluding Thoughts

Esperanto is one of the greatest inventions in human history. It is a great tragedy that it wasn't adopted as the world language in the inter-nationalist 20th century, and it is still not being given the support it deserves in the globalized 21st century. Can anything be more important for the future of education than a world-wide commitment to teach all children everywhere an easily-learned common global language?

[1] Peter G. Forster, *The Esperanto Movement*, page 172.

[2] Forster's *The Esperanto Movement* tells how Lord Robert Cecil's proposal got the discussion started as well as giving a detailed account of what happened subsequently with regard to Esperanto in the League of Nations and other international organizations. See chapter 6, pages 169-187.

[3] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. On page 717 the reported number of persons using English as their first language is 328 million. On page 733 the reported world population is 7,017,543,964. Thus the proportion using English as their first language is 4.67436 percent.

[4] *The World Almanac and Book of Facts-2013*. On page 717 the reported number of persons using Mandarin Chinese as their first language is 845 million. On page 733 the reported world population is 7,017,543,964. Thus the proportion using Mandarin Chinese as their first language is 12.04218 percent.

[5] Alvino E. Fantini and Timothy G. Reagan, *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. See especially pages 27-33.

[6] Helmar Frank, "Valeur propédeutique de la langue Internationale" ["Propadeutic Value of the International Language"], *Journée d'étude sur l'Esperanto*. University of Paris-Vincennes, Nov. 1983, pp. 121-136 and J. H. Haloran, "A four-year experiment in Esperanto as an introduction to French," *British Journal of Educational Psychology*, Vol. 22, nr. 3, Nov. 1959, pp. 200-204..

[7] Kurt E. Müller, (ed.), *Language Status in the Post-Cold-War Era*. See especially pages 117-139.

[8] Humphrey Tonkin and Grahame Leon-Smith, *The Future of Modern Languages in English-speaking Countries*, (Esperanto Documents, New Series, 18). Rotterdam: Universal Esperanto Association, 1979, page 17.

[9] Ulrich Lins, "Esperanto as Language and Idea in China and Japan," *Language Problems and Language Planning*, 32:1 (2008), pp. 47-60 and "China Interreta Informa Centro: Historia de Esperanto" (Chinese Internet Information Center: History of Esperanto), <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.

References:

- Blanke, Detlev. *Plansprache und Nationalsprache [Planned Language and National Language]*. Berlin: Humboldt University, 1976.
- “China Interreta Informa Centro: Historia de Esperanto” (“Chinese Internet Information Center: History of Esperanto”), <<http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/index5.htm>>.
- Cwik, Michael, Hans Erasmus, Edward Symoens, Elisa Kehlet, Gregoire Maertens, and G. Martinetto. *Komunikado en la Europa Komunumo [Communication in the European Community]*. Rotterdam: Esperanto-Asocio, 1992.
- Eichholz, Rüdiger and Vilma Sindona Eichholz. *Esperanto in the Modern World*. Bailieboro, Canada, (2nd ed.), 1982.
- Fantini, Alvino E. and Timothy G. Reagan. *Esperanto and Education: Towards a Research Agenda*. Washington: Esperantic Studies Foundation, 1992.
- Forster, Peter G. *The Esperanto Movement*. The Hague: Mouton Publishers, 1982.
- Frank, Helmar. “Valeur propédeutique de la langue Internationale” [“Propadeutic Value of the International Language”], *Journée d'étude sur l'Esperanto*. Univ. of Paris-Vincennes, Nov. 1983, pp. 121-136.
- Glossop, Ronald J. “Kial Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto” [“Why China is a fertile field for the teaching of Esperanto”], *Internacia Pedagogia Revuo*, 2011/3, pp. 26-28.
- Haloran, J. H. “A four-year experiment in Esperanto as an introduction to French,” *British Journal of Educational Psychology*, Vol. 22, nr. 3, Nov. 1959, pp. 200-204.
- Kováts, Katalin (ed.), *La Komuna Europa Referenckadro [The Common European Reference Framework]*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2007.
- Lins, Ulrich, “Esperanto as Language and Idea in China and Japan,” *Language Problems and Language Planning*, 32:1 (2008), pp. 47-60.
- Martinelli, Perla and Giorgio Silfer, *Universala Deklaracio Pri la Lingvaj Rajtoj [Universal Declaration of Language Rights]*. La Chaux-de-Fonds, Switzerland: Kooperativo de Literatura Foiro, 2001.
- Müller, Kurt E. (ed.), *Language Status in the Post-Cold-War Era*. Lanham: University Press of America, 1996.
- Pei, Mario. *Wanted: a world language*. New York: Public Affairs Committee, 1969.
- Tonkin, Humphrey and Grahame Leon-Smith, *The Future of Modern Languages in English-speaking Countries*, (Esperanto Documents, New Series, 18). Rotterdam: Universal Esperanto Association, 1979.
- World Almanac and Book of Facts-2013, The*. New York: World Almanac Books, 2012.

Topic for this presentation: Innovative Teaching and Learning Methodologies.

Noto de la redaktoro: Ĉi tiu artikolo estas havebla en la angla kaj en Esperanto ĉe la retejo de AAIE.

Kalendaro

2014

11-20 aprilo

Kino-Teatro-Festivalo en Langley, Vaŝingtonio, sur la insulo Whidbey. Okazos klasoj pri la scenartoj (kino, teatro, muziko, danco) Informo: <http://www.kotofesto.org/> Vidu ankaŭ la artikolon sur paĝo 10.

18-20 aprilo

Nord-Okcidenta Regiona Kunveno (NOREK) en Langley, Vaŝingtonio, sur la insulo Whidbey. Informo: <https://sites.google.com/site/noreklangley2014/>

17-19 majo

11-a Mez-kanada renkontiĝo de Esperanto (MEKARO) en Ŝerbruko (Sherbrooke), Kebekio, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas diversaj vizitoj, ekskursoj kaj komunaj manĝoj. Informo: <http://mekaro.ca>

29 junio-8 julio

Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ĉe la Universitato de Viktorio, en Viktorio, BK, Kanado, sur la insulo Vankuvero. Informo: <http://nask.esperantic.org/venonta>

6-12 julio

10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka, Kroatio. Informo: <http://eeu-kongreso.webnode.com>

11-14 julio

62-a Landa Kongreso de Esperanto-USA en Viktorio, BK, Kanado. **La jarkunsido de AAIE** okazos kadre de la kongreso. Informo: <http://esperanto-usa.org>

12-20 julio

Somera Esperanto-Studado (SES) en Nitra, Slovakio. Sama programo kiel en Rusio en aŭgusto; rabato por tiuj, kiuj parto prenas ambaŭ. Informo: <http://ses.ikso.net/2014/sk>

18-25 julio

70-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Fortalezo, Brazilo. Informo: <http://ijk.brazilo.net>

19-25 julio

47-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Montevideo, Urugvajo. Informo:

<http://ilei.info>

26 julio - 2 aŭgusto

99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero (Buenos Aires) Argentino. Informo: <http://uea.org/kongresoj>

17-25 aŭgusto

Somera Esperanto-Studado (SES) en Mendelejevo, Rusio (apud Moskvo). Sama programo kiel en Slovakio en julio; rabato por tiuj, kiuj parto prenas ambaŭ. Informo: <http://ses.ikso.net/2014/ru>

2015

julio

100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo (Lille), Francio. Informo: <http://uea.org/kongresoj>

Bv informi la redaktoron pri aliaj aranĝoj. Pli aktuala kalendaro troviĝas ĉe <http://aaie.us>. Por granda listo de Esperanto-aranĝoj tra la tuta mondo bv vidi la retpaĝon <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>.

Kino-Teatra-Festival kaj NOREK

De la 11-a ĝis la 20-a de aprilo 2014 okazos Kino-Teatro-Festivalo en la urbeto Langley sur la insulo Whidbey en la usona ŝtato Vaŝingtonio. Okazos ses tagoj de klasoj kaj kreado de novaj verkoj en la kampoj de teatro, danco, muziko, kaj filmfarado. La laborlingvo estos Esperanto sed estos ankaŭ lingvo-kursetoj por

komencantoj. La semajnfino de la 18-a ĝis la 20-a alvenos la Nord-Okcidenta Regiona Kunveno (NOREK) en la sama urbeto por kunkongresi.

Plena infomo troviĝas sur la reto ĉi tie:

<http://www.kotofesto.org>

<https://sites.google.com/site/noreklangley2014>

En la Venonta Numero

Se mia sano daŭre pliboniĝos, mi intencas aperigi la *Bultenon* multe pli ofte dum 2014, kaj tiucele mi petas vian helpon.

Se vi havas novaĵon, instruis aŭ partoprenis kurson, faris prelegon, aŭ faris ion ajn kiu eble interesos aliajn membrojn de AAIE, bonvolu sciigi nin. Simpla retmesaĝo al Gary@DGaryGrady.com sufiĉos.

Aparte bonvenaj estas fotografajoj! (Memoru, ke vi treeble ĉiam portas fotilon en la formo de poŝtelefono.)

Mi invitas vin ankaŭ sendi leterojn kaj retmesaĝojn al la redaktoro por apero en la *Bulteno* kaj/aŭ la retejo por informi pri estontaj aŭ pasintaj eventoj aŭ novaĵoj. Ĉu vi legis interesan libron aŭ artikolon pri instruado? Ĉu vi

vidis bonan filmon ĉe YouTube aŭ trovis utilan retejon? Informu nin.

Kompreneble, estus tre bone ankaŭ ricevi artikolojn (eĉ tre mallongajn) de la membraro. Ĉu vi memoras interesan sperton rilate instruadon? Ĉu vi havas ideon pri nova (aŭ malnova) maniero instrui? Vi povas skribi ion pri tio, kaj jen artikolo.

Mi planas eldoni la venontajn numerojn de la *Buteno* en aprilo post NOREK, en junio antaŭ NASK kaj la landa kongreso (kaj jarkunsido de AAIE), kaj en aŭgusto aŭ septembro post la Universala Kongreso.

Denove, viaj raportoj kaj fotografajoj pri tiuj eventoj (kaj aliaj) estas tre bonvenaj.

American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR

Name Address _____

Email address _____

COURSE

Location _____

Tuition cost _____

Level: Elementary _____ Intermediate _____ Other _____

Beginning and ending dates _____

Number of lessons _____ Duration of each lesson _____

Material used: Books _____

Videos _____

Other _____

STUDENTS

Number finishing course _____ Age range _____

Previous language skills _____

Is the course shown in the student records? _____

Was an AATE exam administered? _____

FORMATION OF CLASS

Name of organizer _____

Publicity method used _____

Supplier of course materials _____

COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity

Concerning materials

Concerning teaching

Please return this form to:

Ronald Glossop
8894 Berkay Avenue
Jennings MO 63136-5004

E-mail: rglossop@mindspring.com

You can also report your teaching on our website at <http://aaie.us> (select “Raporti kurson” from the menu).

American Association of Teachers of Esperanto

MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME _____ PHONE (____) _____

ADDRESS _____

CITY. STATE _____ ZIP _____

E-MAIL ADDRESS _____

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

My telephone number My e-mail address Other _____

NAME & ADDRESS OF SCHOOL _____

Are you a professional educator? Yes, active Yes, retired No

Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive “Bulletins” previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

Please check one membership category below:

One year membership with publications by mail in paper form: \$50

One year membership with publications via the Internet in PDF form: \$25

Membership for which calendar year? 20____

New Renewal Today's date: _____

I enclose \$ _____ as a donation to AATE.

Total enclosed: \$ _____.

Please make your check payable to “American Association of Teachers of Esperanto” or “AATE” on a U.S. bank in U.S. dollars and mail it together with this form to Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521. To join on line and pay by credit card, visit <http://esperanto-usa.org/retbutiko>